Protokolo de la estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo
ĵaudon la 20-an de marto 2025 per Zoom

Ĉeestis Bård Hekland, Jardar E. Abrahamsen, Claude Rouget, Lars Sandbakk kaj Marianne Lund.

1. Aprobo de la tagordo. La tagordo aprobiĝis.

2. Trarigardo de la protokolo de la pasinta estrara kunveno la 6-an de februaro 2025
Marianne faros novan version de la protokolo surbaze de proponoj de Claude.

3. Esperantonia
La luantoj faris grandan ordigan kaj purigan laboron en la antaŭĉambro, kiu nun aspektas tre orda. Venonta paŝo estos ordigi la malantaŭan oficejon kaj la antaŭkelan ĉambron, kie nun estas multaj paperaĵoj kaj libroj. Pro blokita aerumilo kaj sekva malsekeco, malkovrita de la luantoj, ioma kvanto da libroj estas en malbona stato. Post malblokigo de la aerumilo la malsekeco ne plu estas problemo. La luantoj venigos elektriston por kontroli la sekurecon de la elektra sistemo. La luanoj pagos 4600 monate dum la supra oficejo estas neuzebla, poste mil kronojn pli. Ili estas nun triope, eble aliĝos kvara, kiu verkas doktoran disertacion pri filozofio. La luantoj konsentas fari kelkajn taskojn por NEL, ekzemple malplenigi la poŝtkeston kaj forsendi poŝtaĵojn. Ili eventuale kapablus fari profesiaspektan ekspozicion por la fenestro.

4. Jarraporto 2023 Bård verkis proponon. Ni aldonu la lastajn mankantajn informojn.
5. Jarraporto 2024 Bård verkis proponon. Ni aldonu la lastajn mankantajn informojn.

6. Jarkalkulo 2024 La revizoro reviziis la jarkalkulon kaj taksis, ke ĝi donas ĝustan kaj fidindan bildon de la financoj de NEL en 2024, kun malprofito de 16 516 NOK. La estraro de NEL, surbaze de la revizora raporto, agnoskas la jarkalkulon 2024 kaj proponas al la landa kunveno aprobi la ĝin.

7. Biblioteko kaj librovendado La luantoj pretas forsendi librojn, kiujn aĉetantoj mendos de NEL.

8. Norvega Esperantisto kaj la Nacia Biblioteko
La Nacia Biblioteko petas nin elekti unu el jenaj solvoj: 1) opphavsrettslisens + tuja aliro, aŭ 2) CC + la ebleco de «sperrefrist». Ni elektas la unuan. Jardar prizorgas la kontakton kun la biblioteko.

9. Memorigo al la nepagintoj – Claude sendis memorigojn al la nepagintoj.

10. Porkomencanta kurso 2025
Bård prizorgis anoncojn en Facebook same, kiel antaŭajn jarojn. Tamen, nur unu persono aliĝis. Ni prokrastas la kurson unu semajnon, do la unua vespero okazos la 26-an de marto, kondiĉe ke aliĝos kelkaj novaj kursanoj.

11. Podkasto kun Einar Tørnquist
Jardar rakontis pri sia partopreno en la podkasto «198 land med Einar Tørnquist». La estraranoj unuanime opinias, ke la podkasto bonege prezentas Esperanton.

12. Eventualaĵoj
Claude faros petojn al legaco Uhlen laŭ pli fruaj estraraj decidoj.
Landa kunveno en junio: Ni petos Kjell Heggvold Ullestad prelegi post la formala programo.

13. Venonta estrara interkonsiliĝo
La venonta estrara interkonsiliĝo okazos ĵaŭdon la 24-an de aprilo 2025 je 20.30.

Protokolis Marianne Lund